Krom referenco al liaj du publikigaĵoj en SR 4/2001, mi kopias tri bildojn, kiujn la Magistrato de Êsvego ekspoziciis (inter granda nombro de aliaj Ŝaŭmbergaj artaĵoj) de la 16-a de junio ĝis la 7-a de julio 2002 en historia urba salonego honore al la jubileulo.



Bildo 3: *G.Schaumberg*, Diablomuro (*Teufelsmauer*), mikstelĥniko, 1999

Dum sia longa vojiro de artisto, *Schaumberg* trovadis tute malsamajn alpaŝojn al sia bildmotivaro: post lia pli frua realismo sekvis lia surrealismo. Trans ĝi li iris al liberaj formoj de pentrado ĝis – nun en sia matura verkado – li revenas al objektivaĵoj. Kio tamen ĉiam restadis, estas lia rilato al la naturo, nome la rilato al ties strukturoj kaj formoj. Kiel aŭtodidakta erudito en geologio kaj paleontologio, li ne kontentigis sin per pentrista inspiriĝo, sed celis al scienca klarigado de problemoj. Por ilustri ĉion ĉi, perfekte servas liaj pentraĵoj "Kreskado"(blua/nigra), "La Ponto" (hele blua/bluverda) kaj "Diablomuro" (malhele bruna/griza).

Mi elkore gratulas kaj deziras, nome de la ISAE-membraro, oran vivo-vesperon kaj familian feliĉon. *R .Sachs*, ISAE-prezidanto

Ankaŭ nia kara prezidanto jubileas

Vane li provis kaŝi sian aĝon antaŭ
eventualaj junaj adeptinoj al ISAE...

Prof. Dr. Rüdiger Sachs: 75 !

Li naskiĝis la 13-an de aŭgusto 1927 en *Völkershausen*, malgranda vilaĝeto en Heslando, Germanio. Post la lerneja tempo ekde 1933 sekvis malfacila vivoperiodo: jam la 17-a de februaro 1943 abrupte finis lian lernejan karieron, ĉar la klaso de la "Supra Lernejo por Knaboj" en *Offenbach / Main* eksiĝis. La 15jaraĝajn lernejanojn oni laborigis militgrave je kontraŭaviadilaj kanonoj kaj post du jaroj, nur 17jaraĝa, komence de 1945 soldatigis. La dorne aventuran etapon nia nuna jubileulo sukcesis fidele skizi en maldika libro "*Ich lief nur mit*" (Mi kuris nur kune). Lia atentotena priskribo estas aperinta jam en tri eldonoj: 1948, 1963, 1997. Treege leginda faktografio! Lastapaĝe eblas vidi foton el marto 1948: ĝojege bonvenigas panjo sian filon revenintan el la trijara ruslanda militkaptiteco...

La mirakle transvivinta junulo, post la maturekzameno (februaro 1949) dediĉis sin al la studado de la veterinara medicino ĉe la Universitato *Giessen*, doktoriĝis en 1955 kaj profundiĝis siajn konojn pri tropikaj malsanoj kaj parazitologio en la Universitato de Pretorio, Sudafriko. Kiel ŝtata veterinaro li deĵoris en Namibio, kiel esploristo en Tanzanio, kiel universitata docento en Kenjo. Sekvis tre ambiciaj esploroj en Niĝerio, Kamerunio kaj Burkinafaso. En 1979 li fariĝis direktoro de la esplorlaboratorio de Hamburga Tropika Instituto en Liberio. Lia specialiĝo kondukis lin al Eburio, Peruo, Gabono. *Sachs* habilitiĝis en 1978 kaj profesoriĝis en 1986 ĉe Naturscienca Fakaro de Universitato en Hamburgo.

Eblus verki monumentan romanon pri nia "Sakso", sed por tio necesus havi veran literaturan talenton, kapablan amuze trakti pri la pli ol 100 sciencaĵoj el la diversspeca esplorado en la tropika sfero. Ĉu kredeble, ke li krom ĉio ĉi siatempe sukcesis edziĝi en 1956 al *Christine von Kehler*? Ŝi, la bravulino, naskis al li tri filojn kaj du filinojn.